# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**




**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**




**PLENUMITA 13/01/2022 Kvincentsesdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

*Uzindaj ligoj* *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

## Entute 791,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **291,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **211,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **182,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

Omicron science, good news - YouTube



**la esperanta retradio donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**



**Vojo el izolecado** **7a januaro 2022**

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



## EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). Numero 68 de "Por Komencantoj".

**GRAMATIKAJ GVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1). Jen ĉeffraza antecedento kun pluraj epitetoj: a). La sidanta viro. b). La konata viro. c). La silenta viro. ĉ). La malbona viro. d). La feliĉa periodo. e). La malĝoja periodo.

2). Jen la samaj ĉeffrazaj antecedentoj kun la samaj aŭ similaj suplementoj: a). La viro sur la seĝo. b). La viro en la televido. c). La viro en la aŭskultantaro. ĉ). La kontraŭ ĉiuj aliaj homo. d). La periodo en la kamparo. e). La periodo de feliĉo.

3). Jen la samaj ĉeffrazaj antecedentoj kun la samaj aŭ similaj subfrazoj: a). La viro, kiu sidas tie. b). La viro, kiun mi konas. c). La viro, kiu aŭskultas. ĉ). La viro, kontraŭ kiu ni batalu. d). La periodo, kiam mi loĝis tie. e). La periodo, pri kies finiĝo mi ploris.

DEMANDOJ: 1). Indiku la vortojn kiuj estas parto de ĉiu supra subfrazo.
2), Ĉe la suplementoj, diru kiuj estas la kompletaj suplementoj en numeroj ĉ), d), kaj e).
3). Ĉe la subfrazoj, diru ĉiujn vortojn de la rilata pronomo en frazoj a), b), c), ĉ), d), kaj e).

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 565. *Marcel Leereveld.*

## 7 MORTIGAJ PEKOJ

.Mi tradukis vortojn de Gandhi *Peter Danzer*

1 Riĉeco sen laboro

2 Plezuro sen konscienco


3 Scienco sen humaneco

4 Scio sen karaktero -

5 Politiko sen principo

6 Komerco sen moraloj

7 Adoro sen ofero



Mahatma Gandhi

# SAĜAJ VORTOJ EL ANTAŬ 63 JAROJ.

En Decembro 1959, AEA eldonis anglan numeron de sia oficiala organo, *The Australian Esperantist,* honore al la centjara jubileo de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Inter aliaj al mi bone konataj kontribuantoj (*Fred Banham, Ken Linton, Herbert Koppel, Ralph Harry, D-ro Caldera*) estis la juna Marcel Leereveld, kiu verkis pri: *The Educational Value of Zamenhof's Gift to the World.* Kun la afabla permeso de Marcel, mi tradukis ĝin por niaj *AE*-legantoj.



*Vera Payne.*

## LA EDUKADA VALORO DE LA ZAMENHOFA DONACO AL LA MONDO

En ĉiuj vivostiloj ni rimarkas kiel establitaj moroj, iloj kaj labormetodoj persistas, kvankam novaj kaj pli bonaj haveblas. Ĉi tio estas parte pro la homa manko de kuraĝo kaj pionireco, parte pro financaj interesoj, kaj parte pro nekapableco de la pli maljuna generacio adaptiĝi al nova mondo.

En la kampo de edukado, ni trovas la saman fenomenon. Eĉ kursaroj de individuaj lernejoj, kiuj pretendas esti *modernaj, progresemaj,* aŭ *eksperimentaj*, ofte ja estas, sed nur pro kelkaj kaptilonovecoj. ("*catch-novelties*") Ili montras ĝenerale timeman hezitecon ŝanĝiĝi de tradiciaj temoj, kursoj aŭ instrumetodoj al aliaj jam pruvitaj esti pli valoraj en specifaj kazoj. Ĝenerale la malnova sistemo simple vivas plu, en nova maskovesto. Do, ne mirinde, la instruado de Esperanto, tiom grande valora por la infana edukado kaj por studado de la propraj kaj alilandaj lingvoj, ne establiĝis pli vaste en lernejoj. Estas la vero, ke nombro da lernejoj ĉirkaŭ la mondo jam enkondukis Esperanton, ĉu devige ĉu libervole, ĉu en ekster-normalaj lecionhoroj, en siajn instruplanojn. Sed: instruistoj de la angla, la franca kaj la latina povus cedi periodon por Esperanto, kies studo helpas, finfine, multe pli ol unu ĉiusemajna periodo.

## Kio, do, estas la beneficoj de Esperanto en la lernejo? Jen kelkaj.

1. Esperanto estas kvinoble pli facila ol iu nacia lingvo, inkluzive de la propra. Tio signifas, ke lernanto devas elspezi nur kvinonon de tempo elspezata je iu ajn nacia lingvo instruata, por atingi ekvivalentan ekzameneblan nivelon. Elspezi tiom da Esperanto-tempo en la lernejo kiom li nun faras je, ni diru, la franca, lernanto estus tiom kapabla ĉe la fino de sia licea kursaro en Esperanto kiom la universitata studento estas kapabla en la franca post tri jaroj da studado en tiu kampo, kaj ankaŭ estus farinta egale ampleksan studadon de literaturo.

Daŭrigota. *Marcel Leereveld.*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 15a de januaro estos la tria sabato. Venu!

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ**:

1). a) "kiu sidas tie". b) "kiun mi konas". c) "kiu aŭskultas". ĉ) "kontraŭ kiu ni batalu". d) "kiam mi loĝis tie". e) "pri kies finiĝo mi ploris".

2). En ĉ): "kontraŭ ĉiuj aliaj". En d): "en la kamparo". En e): "de feliĉo".

3). En a): "kiu". En b): "kiun". En c): "kiu". En ĉ): "kontraŭ kiu". En d): "kiam". En e): "pri kies finiĝo". *Marcel Leereveld.*

China's Excellent, Very Good Year – The Greanville Post




**2021 estis la plej bona jaro en la moderna ĉina historio.**

Jen kion ili plenumis: (Notu; la rugaj vortoj estas ligoj)

Forigita ekstrema malriĉeco. poverty.
Atingis 98% da domposedo. ownership
Tenis la mortoprocenton de Covid je 0.6% (Multe malpli alta ol tiu de Usono)
Kreskigis la ekonomion de $ 2 bilionoj, Jaron post Jaro. la plej rapida kresko iam ajn.
Fariĝis la plej riĉa lando sur la tero. richest country
Fariĝis la plej granda eksterlanda investanto de la mondo. investor.
Iĝis la plej granda filmmerkato de la mondo. market.
Produktis unu novan miliardulon kaj 300 milionulojn ĉiun labortagon. billionaire
Kompletigis novajn trajnliniojn en sep landoj, inkluzive de la unua de Laoso.
Cirkulis 15,000 ŝarĝtrajnoj al kaj de Eŭropo, pli ol 30% Jaron post Jaro.
Aliĝis al RCEP-komerca pakto, kun 30% de tutmonda MEP kaj de la monda loĝantaro. RCEP
Vendis 140 miliardojn da dolaroj interrete en 24 horoj (la rekordo de Amazon estas 5 miliardoj da dolaroj). online
Lanĉis la unuan centran bankan ciferecan valuton.
Dominis sciencan esploradon kaj eldonis la plej multajn patentojn el iu ajn lando. patents
Konstruis tri ekzaskalajn komputilojn kiuj gajnis la Gordon Bell-premion por alt-efikeckomputiko. exascale quantum
Konstruis programeblan kvantuman komputilon 10,000x pli rapidan ol Sycamore de Guglo.
Funkciigis la unuan integran, 3,000-mejlan, komercan, kvantuman komunikadoreton. quantum
Enretigis du gasmalvarmigitajn atomcentralojn *Pebble Bed.* online
Ekbruligis du tori-fueligitajn reaktorojn, eliminante uranion de elektroproduktado. thorium
Liberigis Covid-traktadon, kiu reduktas enhospitaligojn kaj mortojn 78%. treatment
Faris 55% de tutmondaj energiŝparoj. energy savings.
Generis 1 terawatt de renovigebla energio. renewable energy stations
Instalis unu milionon da 5G bazstacioj, donante al Tibeto pli bonan 5G-servon ol Novjorko.
Komunikado inter satelitoj per laseroj, 1,000x pli rapida ol radiondoj. lasers,
Funkciigis la plej potencan solidan raketmotoron de la mondo, kun 500 tunoj leviĝo. engine
Flugigis tri hipersonajn misilojn ĉirkaŭ la planedo. missiles
Liberigis frakcian enorbitan bombadmisilon de alia misilo je 17,000 mph. bombardment
Samtempe komisiis tri batalŝipojn, iĝante la plej granda mararmeo de la mondo. warships
Atendu, ke Ĉinio daŭrigos ĉi tiun ritmon ĝis 2022 lanĉante, interalie, la unuan, verdan kampon, aŭtomatigitan urbon de la 21-a jarcento por ses milionoj da lertaj laboristoj. Kun 70% da arbaroj kaj lagoj, la plej laŭta sono estos birdkantoj.

Notu; Ĉi tiu artkolo estis maŝintradukita.
La originala kopio traduktebla al multaj lingvoj *Roger Springer*

**3ZZZ** La temoj de la elsendo de la 10a de januaro 2022 estas pri multaj movadaj agoj kaj eventoj kaj pri ĝenerala sinteno rilate vakcinadon *Franciska Toubale*

